3-a Jaro. N-ro 146 APERAS SEMAJNE 16. Julio 1927



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e Gvidanto: E. Lanty | SIDEJO de Ekzekutiva Komitato de SAT 23, rue Boyer, Paris-20e | ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27 Administranto: R. Lerchner

Raportaro de la Ekzekutiva Komitato de SAT

diskutota ĉe la VII-a Kongreso

Laŭ la deziresprimo voĉdonita ĉe la lasta Kongreso en Leningrad[1]) ni komencas en ĉi tiu n-ro la publikigon de la raportaro de la E. K. de SAT. La sperto montros ĉu tia procedo taŭgas kaj devas esti daŭrigota en la venontaj jaroj.

Pro tio la publikigo de kelkaj bonaj artikoloj devas esti prokrastata, kaj aliaj eĉ ne povos aperi, tial ke ili ne plu estos aktualaj.

*

Kiel statas nia afero? Ĉu ĝi kreskis aŭ malkreskis? Kion ni faris depost la Kongreso?

Ni ekrigardu momente malantaŭen. Ni observu la funkciadon de nia SAT-aparato dum la pasinta jaro.

En la ĵusa jaro nia movado ege kreskis, kiel montras la subaj nombroj. Tiuj nombroj iom malsimilas tiujn, kiuj aperis en la Jarlibro, ĉar intertempe varbitaj estis novaj SAT-anoj.

Rimarkinde tiu kreskado estas, se ne ĉie samrapida, almenaŭ ĝenerala, ĉiea.

*

Raporto pri la administra jaro de SAT

(1926/1927)


K-do *Rich. Lerchner.*

SITUACIO DE LA MEMBRARO

La stato de la membraro estis la 20. junio 1927 jena: aktivaj membroj 4593 kaj pasi[illegible] mem[illegible]oj *623*, sume **5216** membroj. [illegible]asintjare je la sama tempo ni havis: *3266* aktivajn membrojn kaj *247* pasivajn, sume 3513 membrojn. En la jaro ni do varbis *1703* novajn anojn.

Laŭ la landoj la nombro de anoj dividiĝas jene (por pli bone montri la kreskon aŭ malkreskon ni aldonas en krampoj la ciferojn de la pasinta jaro):

Alĝerio 11 (1), Argentino 17 (13), Aŭstralio *2* (1), Aŭstrio *264* (191), Belgio 100 (61), Brazilio *2* (2), Britio 193 (109), Bulgario *32* (10), Ĉeĥoslovakio 171 (110), Ĉinio 19 (9), Dancigo 7 (3), Danio — (1), Estonio 15 (14), Finnlando 41 (22), Francio *299* (188), Germanio *1552* (1143), Hispanio 96 (39), Hungario *26* (12), Islando 1 (—), Italio 4 (25), Japanio *27* (19), Jugoslavio 60 (48), Kanado *3* (2), Latvio *29* (7), Litovio 31 (28), Maroko 1 (—), Nederlando 69 (46), Norvegio *27* (19), Nov-Zelando 1 (2), Persio — (1), Polio 50 (39), Portugalio 14 (5), Port. Afriko 1 (1), Rumanio 5 (4), Saarlando 1 (1), Sovetio 1936 (1266), Sud-Afriko 3 (4), Svedio 51 (31), Svisio 23 (13), Tunizio 1 (1), Turkio *3* (—), Usono *28* (*22*).



Kresko de la SAT-anaro

Ni ne preterlasu la okazon ĉi loke danki al niaj varbemuloj. Ja, ni ne dubas, se ĉiu aktiva membro de SAT farus sian devon, ni tre, tre baldaŭ superus la dekan milon. La diskuton pri la kresko aŭ malkresko en la diversaj landoj mi translasu al la kongresanoj.

Plue estas rimarkinde, ke ne nur multaj K-doj novaliĝis, sed ankaŭ la membrokvanto eliminita pro nepago de la ĉi jara kotizo ne estas tiom granda, kiom dum la pasintaj jaroj. Ĉi tiun jaron ni nur bezonis elimini 1235 membrojn (pasintan jaron ni eliminis pli ol 2000 membrojn pro nepago de la kotizo). Estas bedaŭrinde, ke ankaŭ en SAT ekzistas tiaj "sezonmembroj", sed ni konsolu nin per tio, ke tiaj membroj ekzistas en ĉiuj organizoj.

Konsiderante la kreskegon de la membraro dum tiu ĉi jaro ni komprenéble devas konstati, ke tiu kresko plej ekstreme ŝarĝis la Administracion. Kvankam la dungitoj en la administrejo sindoneme laboras dek ĝis dekdu horojn, la administranto eĉ ĝis dekkvin horojn potage, ni ofte ne povis plenumi kelkajn aferojn laŭ nia deziro. Ĝuste en la fako "korespondado" ni devis plej rapide labori. La individuaj interrilatoj ja bezonas pli da tempo ol kolektiva interrilato kaj pro tio ni salutas la proponon de la K-doj el Ĉita. Necesas, ke ni koncentrigu niajn fortojn. Tiu koncentrigo de la fortoj en la SAT-movado ne nur senŝarĝigus la laboristojn en la administrejo, sed ankaŭ ebligus al ni pli ŝpareme labori. Necesas, ke la perantoj ne plu estu hazarde elektataj kiel okazis tro ofte ĝis nun. Ni trovu vojon, kiu pli simpligos la interrilatojn inter la membraro kaj la administrejo.

[1]) Oni legu pri tio en la "Protokolo de la VI-a Kongreso" pĝ. 47.

JARLIBRO 1927 JE FINANCA VIDPUNKTO

Ĉu necesas diri multajn vortojn? Mi kredas ke ne, ĉar ĉiu membro ja mem havas sian Jarlibron en la mano kaj povas mem fari la koncernajn komparojn. Necesas nur tuŝi la financan flankon de la demando.

Tiun ĉi jaron ni eldonis la Jarlibron en kvanto de 5500 ekz. La fakturo de la presisto estis 5227 mk. germ., la banderoloj por la ekspedo kostas al ni 20 mk. germ. kaj por la afranko ni elspezis 538 mk. germ. Sekve la elspezoj por la Jarlibro estas sume 5785 mk. germ. Konsiderante la enspezojn en formo de la membrokotizoj, se ni ronde kalkulas t. e. 1,50 mk. germ., ni ricevas sumon da 7824 mk. germ., sekve restas al ni por aliaj elspezoj: demandiloj, aliĝiloj, membrokartoj, kotizmarkoj kaj administraj elspezoj la sumo de 2039 mk. germ. Estas tute evidente, ke tiu sumo ne estas tro granda por kovri la elspezojn por la supre cititaj aĵoj. El tio ni konkludu, ke ni devas limigi la amplekson de nia Jarlibro aŭ plialtigi la kotizon. Kune kun la lasta Jarlibro la membroj ricevis "demandilon", kies notojn ni volas uzi por la sekvonta Jarlibro. Ja ni jam nun okupu nin ankaŭ pri la financa flanko de tiu aranĝo, ĉar tutcerte, se ĉiu membro aktiva plenumus tiun demandilon, la Jarlibro fariĝus preskaŭ 100-paĝe pli dika ol sen tiuj specialaj notoj. Pro tio estas necese, ke la Kongreso trovu vojon por egaligi tiun pluan elspezon.

"SENNACIULO"

Komence de septembro 1926 ni dissendis pli ol 1000 provekzemplerojn al adresoj, kiujn ni povis havigi al ni. Krome K-do *de Bruin* bonvoleme transprenis la reklam-fakon por niaj gazetoj. Li sendis anoncojn al multaj laboristaj kaj neŭtralaj esp. gazetoj. La sukceso rilate "S-ulon" kompreneble ne forrestis. Sed kvankam ni faris ĉion eblan por almenaŭ altigi nian abonantaron ĝis 3000 abonantoj, ni malgraŭ niaj klopodoj ne povis atingi tiun ciferon. Nun la eldonkvanto de "S-ulo" estas nur 3000 ekz. Abonojn aŭ vendekzemplerojn ni havas en jenaj landoj:

Alĝerio 5, Argentino 17, Aŭstralio 1, Aŭstrio 149, Belgio 66, Brazilio 1, Britio 125, Bulgario 30, Ĉeĥoslovakio 96, Ĉinio 11, Danio 1, Estonio 14, Finnlando 14, Francio 119, Germanio 817, Hispanio 57, Holando 62, Hungario 28, Islando 1, Italio 2, Japanio 28, Jugoslavio 40, Kanado 4, Latvio 27, Litovio [redacted], Maroko 1, Meksikio 1, Norvegio 16, Nov-Zelando 1, Persio 1, Polio 37, Portugalio 10, Rumanio 4, Sovetio 703, Sud-Afriko 1, Svedio 41, Svisio 25, Turkio 2, Usono 25.

Sume ni do ekspedis el la n-ro 142, 2583 *pagatajn* ekzemplerojn. Pasintan jaron antaŭ la Kongreso en Leningrad ni havis nur 2000 abonantojn. Nature la fakto, ke ni devis dum kelkaj monatoj aperigi la gazeton nur dusemajne domaĝis la varbadon. Kaj kredeble ĉiuj konsentos, ke en tiaj kondiĉoj la varbado dum unu jaro de preskaŭ *600* novaj abonoj estas tre ĝojiga kaj esperiga. Kalkulante laŭ la malnova tarifo, t. e. por membroj jarabono 6.— mk., ni ricevis jenan sumon: 15 498 mk. germ., kvankam la anoncoj en "S-ulo" ankaŭ alportas iom da mono, sed tiuj kelkaj centoj tute ne sufiĉas por ekvilibri la buĝeton. Ni devas plue konsideri, ke nia abonantaro ne estis tiom granda komence de ĉi administra jaro, sed nur de n-ro 96 komenciĝis la kresko.

Nun ni rigardu la fakturojn de la presisto. "S-ulo" kostas al ni po n-ro kaj inkluzive kliŝoj 250 mk., por ekspedo ni bezonas po n-ro 75,— mk. germ., sekve ni elspezas po n-ro 325 mk. germ. tio estas dum la tuta jaro 16 900 mk. germ., sekve ni malprofitus 1402 mk. germ., se ni estus konservintaj la malnovan tarifon. Kompreneble ni jam pli malprofitis, ĉar ni devas konsideri, ke nia abonantaro nur lastatempe konsiderinde kreskis. Por ke ni povu konservi la antaŭan tarifon, necesus, ke en la daŭro de ses monatoj vi varbus 1000 novajn abonojn. Ĉar tion ni ne povis atingi, necesis do, ke ni plialtigu la abontarifon — tarifo, kiu tamen restas konsiderinde malpli alta ol tiu de aliaj esp. gazetoj.

Flanke de la Redakcio kaj de la Administracio ĉio ebla estis farata por ebligi ampleksan varbadon de abonoj. Ĉu same la tuta SAT-anaro ankaŭ faris sian devon tiurilate? Pri tio ni dubas. Ni ja opinias, ke ekzistas inter la lab. esperantistaro pli ol 5000 varbeblaj abonantoj. Sed ne ĉiu K-do klare komprenas, ke la gazeto estas la ĉefa, la plej zorginda parto el la SAT-aparato. Kiuj komprenas tion, tiuj devus streĉi ĉiujn fortojn por senĉese plialtigi la nombron de abonantoj.

Ĉe multaj K-doj la dekkvartaga aperado de la gazeto ŝajne kaŭzis ioman konfuzon, ĉar siatempe la administranto ricevis diversajn plendojn pri neriveco de "S-ulo"; sed kontrolante la aferon ni konstatis, ke ni sendis la gazeton, sed ĉar la koncerna K-do ne legis la sciigon de E. K., li kredis ricevi ĉiusemajne "S-ulon". Ekzistis ankaŭ K-doj, kiuj tute malkontentis pro tiu aranĝo. Certe ni ankaŭ ne estis kontentaj, sed la kulpon ni en la Administrejo ne havas. Cetere la abonantoj ne perdis monon per tiu aranĝo, ĉar dum tiu tempo ni aperigis 12-paĝe la gazeton kun sufiĉe densa kompostaĵo. Kompreneble la neinformito ne komprenas tion. Ni nur ŝparis afrankon per tiu procedo. Se ni regule estus ricevintaj nian monon el nia agentejo en Sovetio[1]), tiam ni ne estus devigitaj fari tiun aranĝon.

Per la nova tarifo kaj per pli da komplezemo flanke de la sovetaj instancoj rilate transsendadon de nia al la organizo apartenanta mono ni esperu, ke en la venonta jaro nia evoluado ne estos haltigata.

"LA LERNANTO"

Pri tiu organo aparte raportos K-do *Borrell*, la redaktoro. Necesas nur, ke en la administra raporto ni donu kelkajn informojn je la financa kaj abona vidpunktoj. Komence, kiam E. K. intertraktis kun la diversaj naciaj organizoj, rilate almeton de "La Lernanto" oni povis kredi, ke ĉiuj organizoj almetus tiun folion, sed iom pli poste la afero aliiĝis. Malmendis la gazeteton la "Sveda Lab. Esp. Asocio", same ankaŭ la "Norvega Lab. Esp. Asocio". Restas nur ankoraŭ la "Germana Lab. Esp. Asocio" kun 4500 ekz., la "Franca Lab. Esp. Asocio" kun 100 ekz. kaj la "Hungara Lab. Esp. Asocio" kun 300 ekz., krom tio ni almetas "La Lernanto-n" al "S-ulo" en kvanto de 3000 ekz. Abonantojn al "La Lernanto" ni havas nur 30. — "La Lernanto" kostas al ni po numero 110.— mk. La nuna eldonkvanto estas **8000** ekz.

"SENNACIECA REVUO"

La eldonkvanto de tiu organo estas nun 1500 ekz. Ĝia abonantaro dividiĝas jene:

Alĝerio 1, Argentino 13, Aŭstrio 68, Belgio 34, Brazilio 1, Britio 43, Bulgario 22, Ĉeĥoslovakio 30, Ĉinio 10, Danio 1, Estonio 10, Finnlando 4, Francio 55, Germanio 250, Grekio 1, Hispanio 27, Holando 21, Islando 1, Italio 2, Japanio 37, Jugoslavio 17, Kanado 3, Latvio 13, Litovio [redacted], Maroko 1, Meksikio 1, Norvegio 4, Persio 1, Polio 23, Portugalio 5, Rumanio 1, Sovetio 363, Sud-Afriko 1, Svedio 11, Svisio 7, Turkio 1, Usono 11.

Do, sume ni havas nur 1094 abonantojn. Pasintan jaron je la sama tempo ni havis 1200. Kvankam ni ne bezonas multan afrankon por tiu revuo, ĉar la plej grandan parton ni povas ekspedi kune kun "S-ulo", ni tamen ĉiujare havas malprofiton en la buĝeto de "S. R.", ĉar la abonantaro estas ja tro malgranda. Ekz. ĉiu n-o de "S. R." kostas al ni proksimume 260 mk. germ. ĉe 16 paĝoj, sed ni devas konsideri, ke la Redakcio komence de la jaro eĉ aranĝis kelkfoje 20 paĝojn. Krome ni devas alkalkuli al tiuj 260 mk. minimume 10 mk. por afranko, sekve unu n-o de "S. R." kostas al ni 270 mk. Konsiderante la malnovan abontarifon t. e. 2,50 mk. por membroj, ni enspezas dum la jaro 2735 mk. germ. por "S. R." Konsiderante la elspezojn kaj kalkulante ĉiun n-on nur 16-paĝa ni elspezas dum la jaro 3240 mk. germ., tio estas malprofito je 505 mk. germ. Sed ni ankaŭ devas kalkuli, ke "S. R." portu malgrandan parton da profito por la ceteraj elspezoj (administraj), kompreneble tio ĝis nun ne okazis kaj ankaŭ en tiu fako ni ne povas postuli, ke ni prenu la profiton el la libro-fako kaj donu ĝin al la buĝeto de "S. R." Ni devas zorgi, ke ĉiu fako

[1]) Oni legu en alia ĉapitro pri tio.

SAT-anoj, partoprenu amase la VII-an Kongreson de via Asocio en Lyon (Francio) de 12.—16. de aŭgusto 1927

por si mem almenaŭ egaligu la buĝeton. Pro tio ni estis devigataj ankaŭ plialtigi la tarifon de "S. R." Plue ni devas konsideri, ke "S. R." ĉiam enhavas tre densan kompostaĵon, kiu multe pli karigas la revuon ...

Bedaŭrinde depost januaro 1927 la abonantoj kaj kompreneble ankaŭ la administranto spertis la malakuratecon de nia Redakcio. Kaj malgraŭ la severaj plendoj, senditaj al Moskvo, la afero ne aliiĝis. Tre ofte verŝajne la abonantoj pensis, ke tiu malakurateco estas kaŭzita en la administrejo, kaj ni ricevis de la abonantoj riproĉojn, kiuj estis justaj, sed ili estis senditaj al la malĝusta adreso. Ni nenion povis fari kontraŭ tiu malakurateco. Tio kompreneble kaŭzis multe da nenecesa korespondado kaj tre verŝajne ankaŭ la malkreskon je 106 abonantoj dum la jaro. Nur al la malakurateco en la aperado ni ja povas atribui la malkreskon, ĉar sufiĉa reklamado estas farita por "S. R." Ni devas trovi vojon por denove starigi la akuratecon en la liverado de nia monata revuo. Cetere la Direkcio jam de kelka tempo klopodas por trovi kontentigan por ĉiuj solvon al tiu problemo.

EKZEKUTIVA KOMITATO

Laŭstatute la Ekzekutiva Komitato konsistas el 9 membroj. Fakte ĝi konsistas nun el 5 membroj en Paris, 2 en Leipzig kaj 1 en Moskvo.

La Parizaj membroj (K-doj *Banmer, Cachon, Glodeau, Lanty kaj Roux)* kunvenas regule 2-foje en la monato, kaj pli ofte, se necese. Post ĉiu kunveno, kopio de la protokolo estas sendata al la ceteraj E. K.-anoj, K-doj *Lerchner* kaj *Richter* en Leipzig kaj K-do *Nekrasov* en Moskvo.

La sekretariadon tenas K-do *Glodeau*, K-do *Lanty:* Prezidanto, K-do *Roux:* Vic-prezidanto, K-do *Cachon*, Protokolanto.

Laboro ne mankas al E. K., sed nur tempo kaj laborrimedoj. Ĉe alia parto de la raporto ni parolas pri dungo de oficisto en Paris, kiu estos samtempe redaktor- kaj sekretarihelpanto. Tiu dungo estas absolute necesa, ĉar la tasko estas tro peza por K-doj kiuj povas sin doni al SAT nur post la panakira laboro. Cetere necesas noti, ke K-doj *Cachon, Glodeau* kaj *Roux* okupas ankaŭ postenon en la estraro de FEO(poresperanta aparato franclingva) kaj sekve ne povas dediĉi sian tutan liberan tempon al la laboroj de la E. K.

Plaĉas al ni konstati, ke tre bonkamaradece interrilatas la membroj de E. K.

RILATOJ INTER LA SENNACIECA KONSILANTARO KAJ LA EKZEKUTIVA KOMITATO

Daŭre glataj estas niaj rilatoj kun la Konsilantoj. Ni demandas ilian opinion ĉiufoje kiam ni troviĝas antaŭ grava problemo, kaj raportas al ili ĉiufoje kiam ni devis mem solvi urĝan problemon. La plimulto el la Konsilantoj regule kaj akurate respondas; kelkaj iafoje forgesas respondi aŭ eĉ silentas tute. Ĉi tie ni tamen devas mencii la strangan sintenadon de unu Konsilanto, K-do *Franz Jonas*, en Wien: depost majo 1926, li ne donis vivsignon al ni. La 10-an de oktobro 1926, ni skribis aparte al li: respondon ni ne ricevis. Ni emis pensi, ke nur la poŝto kulpas en tio, kaj ree la 14-an decembron ni sendis rekomendite leteron kun jena enhavo:

Estimata K-do!

La 10-an de oktobro, ni sendis al vi leteron, kies tekston vi legos ĉi-sube. Ĝis nun ni atendis vane respondon de vi. Kio do okazis?

(Kopio de nia letero de 10-a de oktobro 1926):

Ni emis opinii, ke via nerespondo al niaj cirkuleroj signifas, ke vi aprobas la sintenadon de E. K. de SAT, kaj ke vi nur pro troa okupateco en aliaj aferoj ne povas al ni respondi. Intertempe nin atingis la famo, ke vi eksiĝis el SAT.

Tion ni ne povas opinii vera, ĉar certe vi, kiu estas kutimata al organizo kaj ĝiaj devoj, precipe konsiderante vian pozicion en SAT, kaj en la landa esperanto-organizo, estus informinta nin pri tiu paŝo viaflanke. Sed ĉar nin neniam atingis letero, en kiu vi estus sciiginta nin pri tio kaj klariginta la kaŭzojn, ni devas tiajn diraĵojn rigardi kiel simplan famaĉon.

Volonte ni vidus, ke vi respondu al nia lasta cirkulero kaj klarigu viajn vidpunktojn kaj opiniojn. Cetere ni tre ŝatus ricevi pli ofte de vi opiniojn, konsilojn, kritikojn ktp. rilate al nia agado kaj la SAT-movado entute.

Tiu letero ankaŭ restis sen respondo. Sekve ni ne scias pri la kaŭzoj aŭ motivoj, kiuj igis nian K-don malzorgi la oficon, kiun libere li akceptis plenumi.

Ni aldonu ke K-do *Kunitaro Fukuta*, en Osaka, eksiĝis pro tio, ke SAT "fariĝis bolŝevika organizo". Ni skribis al nia K-do, ke li bonvolu pravigi sian diron per cito de faktoj, sed neniam ni ricevis respondon.

Do nun la Sennacieca Konsilantaro konsistas el la jenaj K-doj: *Borrell, Nicollet, Richter, Petersen, Muribo, Demidjuk, Smirnov, Izgur, Hajrapetjan, Krjukov, Bajenov, Yoshi, Dambe, Barreira, Kerr, Fröding* kaj *Corral*.

Niajn oficialajn cirkulerojn ni sendas ankaŭ al la Vic-Konsilantoj, kies opinioj kaj konsiloj estas ofte utilaj al ni, kvankam regule la voĉoj de la Vicanoj ne estas decidpovaj en la balotoj.

Post debato inter la Konsilantoj, Vic-Konsilantoj kaj E. K.-anoj, ni alprenis internan regularon, kies teksto estas publikigita en la Jarlibro.

REDAKTOR-DEMANDO

Lastan jaron, pro la senvaloriĝo de l' franko kaj pro kelkaj aliaj prikonsideroj, ni decidis presigi en Paris "S-ulon" kaj niajn aliajn eldonaĵojn. Ni decidis ankaŭ, ke en Paris devas sidi la redaktejo de nia semajna gazeto por ke ĝia ideologia gvidado estu pli facile kontrolebla de la Direkcio. Ni sekve klopodis por dungi redaktoron, kiu povus veni Parizon. Tiucele ni intertraktis kun K-do *Zawada* (Lublin, Polio), kiu devis enoficiĝi la 15-an de julio. Sed, ĉe la lasta momento, pro familiaj motivoj, nia K-do ne povis plenumi la jam faritan kontrakton.

K-do *Lanty* devis do preni sur sin la tutan redaktan laboron, ĝis ni estos dungintaj alian redaktoron. Dum aŭgusto evidentiĝis, ke nia K-do ne plu povos longe elteni: liaj okuloj malsaniĝis kaj tute rifuzis la legadon ĉe arta lumo. Urĝis do trovi se ne teknike tute respondecan redaktoron, almenaŭ helpanton. K-do *Scheithauer* el Wien, kiu tiutempe troviĝis en Moskvo, post ĉeesto al la Kongreso, estis preta tuj veturi al Parizo por teni la oficon. Li enoficiĝis la 16-an de septembro. Tiu K-do estis tro memfida; li ja ne havis sufiĉan klerecon kaj lingvokapablecon por bone plenumi la taskon. Li tamen okupis la postenon ĝis la 25-a de decembro. Tiam la financa situacio devigis nin ĉiurilate ŝparadi; ni do decidis aperigi la gazeton nur ĉiudusemajne kun 12 paĝoj kaj maldungi la "helpanton". K-do *Lanty* denove redaktis sola la gazeton, iom helpite tamen de K-dino *E. K. Limouzin*. Tia situacio daŭris ĝis la 15-a de aprilo, kiam sufiĉe grava malsano trafis K-don *Lanty* kaj tenis lin en lito dum pli ol du semajnoj. Kaj necesis, ke denove la gazeto aperu ĉiusemajne. Ni do estis devigataj dungi K-don *Opi*, kiu povas dediĉi nur parton de sia tempo kaj al kiu sekve ni pagas nur parton de normala salajro. Tiu K-do tenas la oficon depost la 11-a de aprilo kaj ekde tiu tempo respondecas pri la redaktado je la teknika vidpunkto.

Kompreneble tiu situacio povas esti nur provizora. Ni ja bezonas kompetentan redaktoron, kiu dediĉu sian *tutan tempon* al nia afero. Necesas, ke la eldonaĵoj de SAT estu pli kaj pli senriproĉaj je stila kaj lingva vidpunktoj. Kaj tion ni povos atingi nur se ni havas je nia dispono lertan, kleran, sindoneman redaktoron, kiu laboros sub la kontrolo de la Direkcio de SAT. Ni nun klopodas tiucele. Verdire estas malfacile trovi kompetentulon ĉe kiu troviĝas plena SAT-anindeco kaj sindonemo. Ni jam skribe rilatis kun kelkaj K-doj, kiuj pro diversaj kialoj ne povas veni Parizon. Ni esperas tamen, ke baldaŭ la problemo ricevos kontentigan solvon.

Aliĝu tuj al la VII-a Kongreso de "Sennacieca Asocio Tutmonda"

Lyon (Francio) — 12.—16. de aŭgusto 1927

Sendu kotizmonon al K-do Marcel Roux, 90, rue Boileau, Lyon VI (Francio)

RILATOJ DE LA DIREKCIO KUN LA ADMINISTRACIA KOMISIONO

Jam depost la Wiena Kongreso ni havas en Leipzig Administracian Komisionon. Samkiel la E. K. devis esti reelektata post la Leningrada Kongreso, tiel ankaŭ okazis por la Administracia Komisiono. Tiun taskon ni lasis al la Leipzig-a SAT-anaro kiu jam elektis la unuan. Do en sia ĝenerala kunveno de 11-a de januaro 1927, la Leipzig-aj SAT-anoj delegis por formi la novan Adm. Komisionon la jenajn K-dojn: *Schröder, Schulze, Riese, Grünberg, Mehlhorn* kaj *Richter.*

La rolo de tiu organo estas grava, kaj plezure ni konstatas, ke la Komisionanoj ĝin bone komprenis kaj volas plenumi. Ĝis nun ili montris fervoron kaj sindonemon por nia afero; ili ĉiuj ĉeestas regule la kunvenojn, kies protokolon ili sendas al Paris. Ĉe ĉiu kunveno ili staras antaŭ multaj demandoj administraciaj, pli malpli gravaj, kaj ofte ili decidas nur post interdiskuto kun la Direkcio.

La A. K. kaj la Direkcio ellaboris kaj akceptis la jenan internan regularon:

I. Konsisto de A. K.

a) La A. K. konsistas el 6 personoj kaj estas elektata de la Leipzig-a SAT-anaro. Post ĉiu Kongreso ĉiuj funkcioj likvidiĝas kaj devas okazi ĉu novelekto ĉu reelekto.
b) A. K. elektas inter si: 1 Prezidanton, 1 Vic-Prezidanton, 1 Protokolanton, 1 Help-protokolanton, kaj 2 Konsilantojn.
c) Dum la kunsidoj la ĉeesto de la Administranto estas nepre necesa, tamen li ne havas rajton voĉdoni.

II. Funkciado

a) La A. K. kunvenas ĉiudekkvartage kaj se necese eksterordinare. Estas devo de ĉiu A. K.-ano akurate kaj nepre ĉeesti la kunsidojn. Membroj de A. K., kiuj mankis unufoje en la kunsido kaj ne antaŭe informis la A. K.-estron, eksiĝas aŭtomate, kaj la Leipzig-a SAT-anaro devas elekti anstataŭanton.
b) En ĉiu kunsido estas farata protokolo kaj subskribata de la ĉeestantaj anoj. La kopio estas samtage sendata al la Direkcio en Paris.
c) Ĉiu A. K.-ano havas unu voĉon. Ĉe voĉdonado valoras la simpla plimulto. Ĉe samnombreco de voĉoj, la definitiva decido restas al la Direkcio.
d) Ĉiu A. K.-ano nepre konsideru la intertraktaĵojn kiel internajn aferojn de la Asocio, kiuj nur koncernas la Direkcion (Paris) kaj A. K. (Leipzig).
e) Ĉe urĝaj aferoj la A. K. rajtigas la A. K.-estron decidi kune kun la Administranto, tamen en sekvonta kunsido la estro donos raporton pri tio.

III. Taskoj

a) La A. K. de SAT havas la taskon observi kaj konsili la administrantan laborantaron, ke ĝi laboru en la ĝenerala intereso de la Asocio.
b) La A. K. portas la plenan respondecon rilate la financojn.
c) Ĉiutempe ĝi rajtas kontroli la financan situacion de la Asocio (en- kaj elspezoj).
d) Kontroli kaj subskribi (almenaŭ 3 personoj) la monatajn kont-resumojn, sendatajn al la Direkcio (Paris).
e) Ĉiun 1-an de julio la A. K. kune kun la adm. laborantaro konstatas la inventaron kaj starigas la bilancon por la Kongreso. A. K. verkas tutjaran raporton pri sia laboro, prelegata dum la Kongreso.
f) Same labori en la fiksado de la libroprezoj kaj abontarifoj. La A. K. rezervas por si la rajton vidi la materialon (paperspecimenojn, ktp.) de la noveldonaĵoj antaŭ la preso.

KOMISIONO ELEKTITA EN LENINGRAD POR RILATI KUN LA PROPAGANDAJ ASOCIOJ

Tiu Komisiono konsistas el K-doj *Bässler, Deubler, Ebner, Mark Starr, Cuillerdier, Adamson, de Bruin* kaj *Zawada;* K-do *Scheithauer* estas sekretario. Eble ni aŭdos lian raporton. Almenaŭ ĝis nun, ni scias nenion pri la faroj de tiu organo. Ni profitas la okazon por admoni la K-dojn, ke ili ne akceptu taskon, se ili ne intencas aŭ ne povas bone plenumi ĝin. Ni jam multfoje diris, ke en niaj vicoj ne mankas kritikantoj kaj proponantoj; sed malmultaj estas la plenumantoj.

La E. K. ne povas akcepti ian ajn respondecon pri la funkciado de tiu Komisiono. Ni nur diru, ke nuntempe kiel antaŭe, ni estas pretaj bonvoleme ekzameni kun la respondecaj gvidantoj de la por-esperantaj asocioj ĉiujn proponojn, kapablajn antaŭenpuŝi la laboristan esperantan movadon.

Por forigi ĉian ajn miskomprenon pri tiu afero, ni publikigas ĉi tie parton el la letero, kiun siatempe ni sendis al la sekretario de tiu Komisiono:

"Unue ni rimarkigu, ke SAT, kies ĉefa celo estas la *per*esperanta agado, tamen fakte ĉiam estis preta helpi al la *por*esperantaj organizoj, ĉu per publikigo de iliaj raportoj en la rubriko "Kroniko" de siaj presorganoj, ĉu per konigado de faktoj gravaj por la propagando de esperanto, ĉu per eldono de "Petro", ĉu per aliaj rimedoj. Se tiu servado de SAT al la *por*esperantaj organizoj ne estis pli granda, en tio kulpas kelkaj el tiuj organizoj mem, kiuj kvazaŭ ignoris nian Asocion.

Sed malgraŭ tiu plej evidenta bonvolo flanke de SAT, se la *por*esperantaj organizoj volas fari konkretajn proponojn, kiuj eble povus ebenigi la vojon, glatigi la interrilatojn ktp., kompreneble ni estus pretaj atenti tiujn proponojn kaj helpi al ilia efektivigo.

Ni nur restas neŝanceliĝe pretaj defendi la sennaciecan strukturon de SAT; neniam ni konsentos, ke pretekste je pli intima interrilato inter SAT kaj "enlandaj organizoj", kelkaj rutinemaj K-doj provu aliigi SAT-on en ian internaciaĵon.

La sperto ĉiutage pruvas, ke la SAT-eca laboro plej bone efikas, eĉ por la propagando de esperanto. Sekve, ni esperas ke finfine ĉiuj lojalaj kaj sinceraj laboristoj esperantistaj agados en la kadro mem de siaj poresperanta organizo, por ke ĉiuj ties membroj aliĝu al SAT.

Konkrete ni vidas la solvon de la problemo jene:

a) la "enlandaj organizoj limigu sian agadon en la nura propagando de esperanto. Neniel kaj neniam ili konkurencu SAT-on, ĉu per eldono de esperant-lingvaĵo, ĉu aliel.
b) ili rekomendu al siaj membroj aliĝi kaj ĉiel subteni SAT-on.

Kompense:

1. SAT estu ĉiam preta helpi la poresperantan laboron, —
2. SAT rekomendu al siaj membroj, ke ili aliĝu sian "enlandan" organizon.

Jen la opinio de la E. K. de SAT:
Por la E. K., fratece al vi:

P. S.: Kompreneble, se vi juĝas tion utila, ni rajtigas vin uzi ĉi respondon en viaj rilatoj kun viaj kolegoj de la Komisiono."

(Daŭrigota.)

De 12.—16. de aŭgusto 1927 okazos en Lyon (Francio) la

VII-a Kongreso de SAT

SAT-anoj, multnombre ĉeestu la VII-an! Aliĝu tuj! (Vidu la specialajn kongres-komunikojn.)

Letero al tutmondaj Kamaradoj

Karegaj K-doj!

Ni, 2000 laboristoj de ŝipkonstrua fabriko en Sebastopolo, sendas al vi nian proletan saluton. Ni lasu la kapitalistojn semi militon kaj provokadon, mortigojn kaj krimojn. Sed ni frate etendu unu al alia la manon kaj subtenu nin reciproke en niaj ĝojoj kaj malfeliĉoj.

Nun ni skribos al vi iom pri nia vivo kaj laboro. Ĝi ne estas facila. Vi ja scias, ke ni devis ĉion entrepreni dekomence. La milito kaj kontraŭrevolucio restigis al ni detruitan industrion, plenigitajn de akvo minejojn, ruinigitajn fabrikojn ... En nia fabriko la maŝinoj kaj ilaro estas treege eluzitaj. Kompare kun nuntempa tekniko, ni restis treege malantaŭe. Sed kion fari? Dum somera laborinterrompo ni ŝtopas niajn malnoviĝintajn stablojn, por daŭrigi nian laboron por fortigo de nia industrio kaj konstruado per propraj manoj, de nova sociordo. Kaj ni ĝin konstruados. Ni venkis pli grandajn barojn. Nun, kiam la fabrikoj estas en nia dispono, — ni venkos ankaŭ nian malriĉecon. Oni nur ne malhelpu nin, oni nur ne interrompu nian laboron.

Jen malgraŭ la tute ne konformaj maŝinoj, malgraŭ tio ke la fabriko tute ne estis destinita al simila laboro, ĉar ĝi konstruadis nur militŝipojn, ni, venkinte senlimajn barojn, hieraŭ finis grandan komercan ŝipon kaj la saman tagon komencis du novajn.

Nun iom pri nia interna vivo. Nian tutan laboron gvidas nia fabrikkomitato, kiun ni elektas dum nia ĝenerala kunveno. La fabriko havas 2 klubojn, 9 Lenin-anguletojn kaj bibliotekon. Dum tagmanĝa interrompo aŭ post la laboro estas organizataj konversacioj je interesantaj nin temoj aŭ laŭfakaj kunvenoj.

En klubo estas kino-prezentado. Ni havas ankaŭ muzik-rondeton, ĥoron kaj sportrondetojn. La komĉelo de nia fabriko havas grandan aŭtoritaton. Ni laboras 8 horojn, sed je malsanigaj laboroj kaj ankaŭ junuloj laboras nur 6 horojn. Post 5½ monatoj ni ricevas pagotan libertempon por 2 semajnoj kaj en malsanigaj laboroj por 1 monato. Malsanajn laboristojn oni sendas sanigejojn. Certe ne por ĉiuj sufiĉas lokoj, sed ĉiujare la nombro de sendataj pligrandiĝas. Laboristoj postulantaj nur ripozon, estas sendataj en "ripozdomoj" en ĉirkaŭaĵo de la urbo. La "ripozdomoj" estas bonege organizitaj. Laboristoj en belega naturo sub kontrolo de kuracistoj, bonege nutrataj, havas plenan eblecon ripozi kaj kolekti fortojn por nova laboro. Niaj reprezentantoj troviĝas en Urba Soveto kaj en ĉiuj potencorganoj. Ili ofte raportas al ni pri ilia laboro kaj ni donas al ili instrukciojn. Laŭ nia peto ofte la tuta Sovetanaro venas al ni en fabrikon por kunsidi kune kun ni.

K-doj, skribu al ni pri via vivo kaj kondiĉoj de laboro. Ni atendas viajn leterojn.

En nomo de ĉiuj laboristoj

P. Ostrij.

(Sebastopolo. Morzarod. Al K-do *Ostrij.*)



Sacco kaj Vanzetti

sendas adiaŭan leteron al ĉiuj laboristoj

Dum jaroj du homoj vekiĝante ĉiumatene en siaj malliberejaj ĉeloj demandas sin: "Ĉu hodiaŭ ... la morto?" Dum jaroj daŭrus tiu kruela torturo. Miloj da protestkunvenoj, milionoj da leteroj el ĉiuj landoj postulas tujan liberigon — aŭ tujan mortigon de Sacco kaj Vanzetti.

Nun ŝajne la afero transiras decidan fazon. La guberniestro kiu ĝis nun persone gvidis la esploron transdonis ĝin al speciala komisiono. Baldaŭ do estos tia aŭ alia decido.

Dume la revolucia esp-istaro sendu multoble dum lasta horo protesttelegramojn al Governor *A. Fuller,* Statehouse, Mass., USA.

Ĉi sube ni publikigas la adiaŭan leteron de ambaŭ revoluciuloj:

Karaj amikoj kaj kunuloj!

Fiksante la tagon de nia mortigo la malamiko lasis al ni nur malmultajn tagojn por vivado.

Vi volas mildigi nian suferadon, nian ŝarĝon malpezigi kaj nin helpi elporti nian sorton. Fluo da bonaj vortoj fluegas el via buŝo en niajn korojn, via kuraĝigo kaj esprimo de solidareco.

Sed kiel ni povas regule kaj inde al vi respondi en leteroj, kiel ni volonte farus? Ni devas nin limigi je ĉi tiu kolektiva letero al vi kaj certigi vin, ke vi ĉiuj, la konatuloj, kaj la malkonatuloj, la silentantoj kaj la multege parolantaj, vivadas en niaj pensoj kaj en niaj koroj. Ni prenos viajn pensojn kun ni en la tombon.

Sed lasu nin paroli al vi ankaŭ pri la vivo. Kunuloj kaj amikoj, estadu kun bona kuraĝo kaj fortaj koroj. Ne cedu kaj ne lasu haltigi vin eĉ sekundon pro zorgo aŭ malvenko. La malamiko povas kelkajn aŭ multajn de ni malliberigi, turmentadi kaj ankaŭ mortigi. Li povas detrui niajn hejmojn, niajn librojn malmultajn kaj niajn instituciojn, sed la malamiko ne povas detrui ideon, rajtojn, verojn. La ideo ekzistadas.

Havu kuraĝon, antaŭen, antaŭen!

Kun ĝojkuraĝaj kaj amikecaj salutoj viaj

Nikola Sacco, Bartolomeo Vanzetti.

(INO-KOR.)

El la sendependa Polio

INTER INVALIDOJ

(Ankaŭ bildeto)

Antaŭ la pordo de la porinvalida oficejo staras kelkaj militinvalidoj. Ne ĉiuj estas maljunaj, tamen ĉiuj tiel aspektas pro sia mizerega vivo. Vestitaj ili estas en ĉifonaĵoj. La vizaĝoj sulkiĝintaj, la okuloj sen ĝojo. Ankaŭ troviĝas tie ĉi virinoj, kies edzoj aŭ filoj ne povas moviĝi.

Ĉiukelkminute oni enlasas unu personon. La aliaj atendas sian vicon. Dumtempe ili interparolas pri sia terura sorto. Mi staras apude kaj atentas. Ĉiu priskribas la sian. La cirkonstancoj estas diversaj, sed la enhavo ĉe ĉiu la sama: mizero, mizero ...

— Jam 8 jarojn, depost la polia-bolŝevika milito — diras unu — oni lasas min konstante kuradi tien ĉi kaj ne donas la pension. Alterne oni postulas novajn paperojn, kaj kiam mi tiajn alportas, oni denove postulas aliajn ...

— Jes, jes! — enŝovas dua — sed se vi estus riĉe vestita, oni vin tuj kontentigus, memkompreneble ...

— Ne estas bonordo en Polio — opinias tria. — La registaro ne zorgas pri ni, sed pri la plenpoŝuloj. Ni ne havas ankoraŭ *nian* registaron!

— Kaj Pilsudski ne pli bonas ol liaj antaŭuloj — murmuras kvara. — La mono regas ...

Alvenas novaj malfeliĉuloj. La pensinterŝanĝo plivigliĝas.

— Mi havas tri filinojn — krias mezjara virino kun ploro — sed se iu el ili naskos filon, do mi forŝiros de li la kapeton! Li ne estu soldato ...

Ŝia kriado kaj plorado faras al ĉiuj kortuŝan impreson kaj ili aŭskultas ŝin ĝis la fino.

— Mia sola filo — daŭrigas ŝi — ĵus revenis malsana el la kazernoj. Mi turnis min al la armea estraro kun la peto, ke oni akceptu lin en la malsanulejon. Venis kuracisto-majoro, esploris lin kaj diris, ke la danĝero ankoraŭ ne estas tiel granda, kaj kiam li estos agonianta, oni venigos lin en malsanulejon. Tio min tiele kolerigis, ke mi respondis al li per insultoj. Tia aĉulo ...

Ŝi ploras kaj ne povas trankviliĝi. Ĉiuj ĝemetas kaj movas la kapojn.

— Kaj la pastroj — diras iu — ĉu ili estas pli bonaj? Tute ne. Ankaŭ ili ne estas por la justeco, sed por la monhavantoj. Mi jam ne kredas ilin. Ĉe mi estas tutegale: polo, judo aŭ germano. Ĉiu nur volas vivi ...

La invalidoj ankoraŭ interparolas, sed mi jam ne aŭskultas kaj foriras. Mi forlasas ilin kun duobla sento: ĉagreno kaj kontenteco. Ĉagrenigas min la mizera vivo de la malfeliĉuloj, kaj kontentecon mi ĝuas pro tio, ke fine ili komencas kompreni, kiu estas ilia komuna malamiko, kaj ke neniu el ili eĉ per unu vorto provis defendi la patriotismon ...

Iuelmultiuj.

TRA ESPERANTIO

Ĉe la laboruloj.

DISKUTEJO

Kelkaj rimarkoj pri la organizado de SAT

La programprojekto publikigita antaŭ nelonge en „S-ulo“ silentas pri la organiza problemo, pro la rilatoj de SAT kun la landaj esperantoorganizoj laboristaj. Tiu demando estas tamen sufiĉe grava. Nature ne ekzistas ia neceseco por ke la programo absolute enhavu mencion pri la organizado de la movado. Sed la demando postulas solvon, ĉu en, ĉu apud la programo.

Depost kelke da jaroj ni aŭdas plej diversajn opiniojn pri la organiza demando de SAT. Ĉiam denove prezentiĝas la problemo, sed niaj laboroj sur tiu kampo ankoraŭ malmulte antaŭeniris. Kaj devas esti la organizaj rilatoj inter SAT unuflanke kaj la landaj esp-ligoj aliflanke — jen la demando, kiu obstine penetradas niajn ideojn. Pro kio niaj klopodoj[1]) por ĝin solvi, ĝis nun ne sukcesis? Kiajn solvojn oni povus konsideri kiel akceptindajn?

Mi provos, ĉi sube respondi al la demandoj ĉi supraj. Espereble aliaj K-doj ankaŭ skizos sian opinion, por ke ni iomete antaŭeniru al klareco kaj kompreno.

* * *

Ni staras antaŭ la fakto, ke la laborista movado esp-ista dividiĝas en (preskaŭ) ĉiu lando je du organizoj: la landa ligo kaj la SAT-anaro. Multaj proletaj esp-istoj estas samtempe anoj de ambaŭ organizoj; multaj nur de unu el ili. Pro tio ni ĉiam aŭdas ree la demandon: kiel kunligi tiujn organizojn, kiel fiksi iliajn organizajn interrilatojn? aŭ eĉ: ĉu ne valorus kunfandi ilin por krei *unu solan Internacion* de laboristoj esp-istaj?

La esp-ista movado proleta rapide progresas, ĝiaj formoj, ankoraŭ sufiĉe freŝdataj, sekvas la rapidan progreson kaj ŝanĝiĝas rapide laŭ la bezonoj de l' momento. Novaj sukcesoj postulas kreon de novaj organoj, aliformigon de la organizoj, ŝanĝojn de statuto ktp.

La divido de nia movado je SAT kaj landaj ligoj estas la organiza esprimo de la fakta divido inter laboro *peresp-a* kaj *poresp-a*. Ofte la samaj personoj laboras sur ambaŭ kampoj, sed la laboroj mem restas malgraŭ tio malsamformaj kaj malsamesencaj. Se ekzemple grandaj, potencaj organizoj de la laborista movado (partioj, sindikatoj k. sim.) prenus sur sin la propagandon kaj instruon de esp-o, la eldonon de lernolibroj kaj de vortaroj, la plejparto de la funkcioj de la landaj ligoj de proletaj esp-istoj transirus al la cititaj organizoj, sed SAT konservus la peresp-an funkciaron fiksitan en ĝia statutaro. La organizaj rilatoj inter SAT kaj la landaj ligoj dependas memkompreneble de ŝanĝoj kiel la ĵus menciitaj. Post kelke da jaroj (dek aŭ eĉ pli multe da jaroj), la poresp-aj funkcioj ne plu bezonos specialajn ligojn, ĉar la oficialaj batalorganizoj proletaj ilin plenumos.

Sed nuntempe ambaŭ organizoj ekzistas, apudekzistas aŭ kunekzistas, paralele aŭ komune laboras. Finfine tiu kun- aŭ apudekzistado devas trovi regulitan, en statutigitan sankcion. Por trovi tiun solvon, ni ne povas skizi utopiajn projektojn, sed ni devas observi la vivantajn organizformojn de nia movado, kiuj konstante disvolviĝadas kaj en kies konturoj ni devas rekoni la embriajn formojn de l' estonto.

* * *

[1]) Oni legu pri tiu en la raporto de E. K.

SAT kunligas la proletajn esp-istojn de la tuta mondo, sed ne havante poresp-ajn funkciojn, ĝi ne povas kunligi la landajn organizojn. Sed tamen tiuj landaj organizoj bezonas kunigilon, ĉar elŝanĝo de opinioj kaj spertoj de esp-a propagando, diskuto de novaj metodoj kaj apliko de bonaj iloj en tutmonda skalo estus plej utila por nia movado. Ĉiu landa ligo eldonas sian organon, preskaŭ nekonatan de alilandaj ligoj. Kiom da sukceso, da forto, da fruktedona inspiro rezultus el komparo de ĉiuj tiuj organoj. Kiel estus utile se iu tutmonda centro povus ĝeneraligi la bonajn ideojn, metodojn ktp., kiujn ili entenas, kritiki la maltaŭgajn rimedojn, averti ĉiujn K-dojn pri uzindaj aŭ maluzindaj varbprocedoj![1])

Pro tio multaj K-doj pensas, ke internacia kunligo de ĉiuj landaj organizoj estas nepre necesa, kaj ili deziregus, ke SAT fariĝu tiu ĉiuenhava, universala centro de la proleta esp-istaro. Kaj aliaj K-doj, malpli favoraj al SAT, emus krei apartan Internacion de landaj organizoj flanke de SAT.

* * *

[1]) Oni legu pri tio en la raporto de E. K.

ĈU VI VOLAS TRAFE PROPAGANDI ESPERANTON?...

Se jes, nu, klopodu por aperigi en la nacilingvaj gazetoj la tradukon de la ĉi suba teksto. Kompreneble klopodu nur ĉe gazetoj, kiuj jam kelkfoje uzis la servojn de SAT. Rememoru tion al la Redakcioj kaj kompense petu la publikigon de nia anonco.

———

Se la laboristoj, kiuj scipovas nur sian gepatran lingvon, kaj tamen deziras interrilatiĝi **senpere** kun alilandaj samklasanoj, estus bone informitaj pri la facillernebleco de 'Esperanto' kaj ĝia larĝa disvastiĝo tra la tuta mondo, ili certe senprokraste lernus tiun lingvon kaj abonus al

"SENNACIULO"

La unua semajna gazeto laborista en esperanto, fondita en 1924.

Raportoj, informoj pri la vivo kaj bataloj de la Laboristaro tra la tuta mondo. Tribuno por debato pri ĉiuj sociaj problemoj. Diversaj rubrikoj: Radio, Scienco, Tekniko, Marksismo, Feminismo ktp.

Ilustrita, belaspekta kaj bone redaktata en klasika esperanto-stilo.

Redaktejo: 14, Avenue de Corbéra, Paris XIIe (Francio).

Administrejo: Colmstrasse 1, Leipzig O 27 (Germanio).

—o—

"Sennaciulo" estas la oficiala organo de **Sennacieca Asocio Tutmonda**

Tiu laborista organizo havas membrojn en ĉiuj partoj de l' mondo; tamen ili estas ĉiuj samlingvanoj kaj sekve povas senpene interkompreniĝi.

Por ricevi detalajn informojn, oni skribu al la asocia sidejo: 23, rue Boyer, *Paris-XXe*.

Ni povas do konstati, ke kunligo de la landaj organizoj estas necesa kaj utilega por nia movado. Sed fakto staras kontraŭ fakto:

1. La landaj ligoj per grandega plimulto rifuzas krei Internacion de landaj ligoj de proletaj esp-istoj apud aŭ kontraŭ SAT.

2. SAT kiel *peresp-a* organizo, kun tute aliaj laŭstatutaj celadoj, *ne* povas fariĝi Internacio de *poresp-aj* organizoj.

Ĝis nun ni ankoraŭ ne povas nete distingi la vojon, kiu kondukos for el tiu komplikita kontraŭdiro. Artefaritaj konstruoj en tiu demando certe ne efikos. La solvo devas esti organa produktaĵo de la evoluo de nia movado.

Sed eble oni povus jam nun fari kelkajn konkretajn utilajn paŝojn antaŭen. Eble nia Lyon'a kongreso povos esprimi la deziron, ke kelka parto (kolono aŭ paĝo) de "S-ulo" estu rezervata al elŝanĝo de spertoj de la landaj ligoj, al pli detala recenzo de la enhavo de la gazetoj de tiuj ligoj, speciale al diskonigo de karakterizaj propagand- kaj instrumetodoj aplikataj en tiu aŭ alia landa ligo, kies uzado en aliaj landaj organizoj estus valora.[1])

Tia pormomenta solvo ŝajnas al mi plene akceptebla de ambaŭ flankoj. Ĝi estus konkreta paŝo antaŭen, kvankam ĝi ne kontentigos plene tiujn, kiuj postulas tujan kaj centelcentan efektivigon de siaj deziroj. Ĝi donus al internacia centrigo de la landaj organizoj pli firman bazon ol ĝis nun kaj evitus, ke tia centrigo okazus apud aŭ kontraŭ SAT. Ĝi samtempe ne atakus la peresp-an karakteron kaj la sennaciecan strukturon de SAT. Certe neniu SAT-ano rifuzos doni al tiu celo certan spaceron de "S-ulo", ĉar malgraŭ tio, ke nia gazeto, kiel organo de SAT, devas esti dediĉata al peresp-a laboro, SAT kaj ĝiaj organoj, devas favorigi kaj subteni la esp-o-movadon proletan en ĉiuj ĝiaj formoj. SAT neniel perdus sian sennaciecan karakteron, se ĝia gazeto gasteme oferus paĝon por interligo de la landaj organizoj. Kaj finfine tiu provizora solvo permesus al ni atendi sur pli antaŭa posteno ol ĝis nun, ke la cirkonstancoj maturigos kaj permesos pluajn paŝojn antaŭen.

Nature tian decidon povos preni la Lyon'a kongreso nur, se la landaj ligoj konsentas. Estus sekve dezirinde, ke la estraroj de la landaj ligoj diskutu tiun demandon antaŭ nia VII-a.

* * *

Se la kreskado de SAT daŭros, alia problemo fariĝos urĝa: la demando de delegitoj al kongresoj de SAT. Malgranda nombro da membroj povis permesis al SAT organizon kun kongresoj "deziresprimantaj" kaj posta ĝenerala voĉdonado. Sed kiam ni havos 10 000 membrojn, tiaj procedoj fariĝos jam tro komplikaj, kaj tiam ni devus serioze pripensi, ĉu ne estus pli oportuna, ke delegitoj plenrajtigitaj de lokaj SAT-grupoj voĉdonu definitive al niaj kongresoj.[2])

La problemo certe sin prezentas antaŭ ni. Ni jam nun ĝin pripensu. Ankoraŭ estas tempo por diskuti ĉiujn eventualaĵojn, antaŭ ol ĝin realigi. *L. Révo.*

[1]) Neniam ni rifuzis publikigi tiajn artikolojn aŭ informojn.

[2]) Temas decidi ĉu SAT restos tutmonda aŭ nur eŭropa organismo. Ni ne forgesu, ke en Japanio, en Ĉinio, en Usono kaj aliaj ekstereŭropaj mondpartoj ni havas membrojn, kiuj rajtas iel influi kaj kontroli la mastrumadon de nia Asocio. Sekve pasos certe multe da jaroj antaŭ ol **ĉiu** malproksima grupo povos delegi iun al niaj kongresoj. *E. L.*

GRENOBLE

El ĉiuj franciaj urboj, Grenoble estas la plej bela kaj pura. Lokita inter alpaj montoj, tiu 100 000-loĝanta urbo allogas ĉiujn homojn, kiuj ŝatas spiri freŝan resanigan aeron, ĝui belajn vidaĵojn kaj ekskursi sur montojn. Jam kelkaj SAT-anoj esprimis la deziron partopreni la postkongresan karavanon. Ni esperu, ke multaj K-doj respondos favore la inviton de grenoblaj SAT-anoj.



GRENOBLE. — Ĝenerala vidaĵo kaj Alpa montaro

KONGRESONTOJ ATENTU!

La SAT- kaj LEA-grupoj de Stuttgart intencas aranĝi kunvenegon antaŭ aŭ post la sepa SAT-kongreso.

K-doj el orientaj landoj, kiuj vojaĝas de Stettin-Berlin-Leipzig al Lyon estas petataj travojaĝi Stuttgart, por ke ni povu praktike pruvi la taŭgecon de nia movado.

Turnu vin al K-do **Alfred Just, Stuttgart,** Hohenheimer Str. 54.

*

FERA GVARDIO DE SAT

Ĉiuj ĝisnunaj K-doj aliĝintaj al la "Fera Gvardio" aliĝis pro entuziasmaj motivoj, sed mi krom la entuziasmaj motivoj havas ankaŭ pentofaron. Ĉar pli longan tempon, ol estus deca por bona SAT-ano, mi ŝuldis monon al nia financministro, mi kun firma decido deklaras, ke mi aliĝas al "Fera Gvardio" per 12 brikoj (12 rubloj) pagotaj dum unu jaro, el kiuj 2 brikojn por junio kaj julio mi ĉi kune sendas. Vivu la fundamentaj konstruantoj de SAT! Neniu.

Mia junia briko 15 lev., Atanas Lakov, Sadovec.

*

PRI KORESPONDADO KUN SOVETIO

En "S-ulo" de 18. 6., n-o 142, ni legas pri nesufiĉa kontentigo de la korespondemo de sovetiaj K-doj.

En respondo al tiu ĉi demando ni SAT-anoj volas diri kelkajn vortojn.

Kiel ajn ni penas, kaj penis estas apenaŭ eble ricevi korespondadon de Gek-doj el Sovetio. Ni, tri Waldenburgaj SAT-anoj, preferas la Sovetion, ni preskaŭ vundigis niajn fingroĵn pro multa skribado al tieaj Gek-doj, sed... el preskaŭ 20 petoj ni ricevis ne pli ol tri respondojn.

Laŭ la anonco en "S-ulo" n-o 133-134: Proletaj Geknaboj tutmondaj, adreso Ĥabarovsk, Kalliniskaja ul. 52, Redakcii "Znanija Pionera" ni skribis peton pri korespondado kun kelkaj el niaj junaj gelernantoj, sed ĝis hodiaŭ ni restis sen respondo.

Ernst Grundmann (6451), Wilhelm Zigelsky (9240), Karl Kittel (9239).

NIA POŜTO

5328. — La vorto "kvirlo" estas preseraro; oni devas legi: *kirlo*. Signifon legu en la vortaro de Kabe.

La vorto *bombaste* ne estas oficiala sed troviĝas en la vortaro de la akademiano E. Grosjean-Maupin; ĝi signifas proksimume: *emfazege, ŝvelaĉe*. En la franca lingvo oni tradukas ĝin per la vortoj *avec enflure;* en la rusa per *napyŝĉeno*. — *Red.*

9958. — Post la Kongreso ni verŝajne povos disponi lokon en la gazeto por publikigi viajn priskribojn. Sed ni povas promesi nenion al vi antaŭ ol ni estos leginta la manuskripton. *Red.*

3743. — Via alvoko kostas 1.50 mk. g. *Adm.*

9741. — Via "Tago" aperos. Kompreneble ni "permesas" ke vi sendu viajn "rakontojn". Sed neleginte manuskriptojn, ni ne povas fari promeson pri ilia publikigo. *Red.*

*

INTER KONTRAŬULOJ DE ESPERANTO

(El "*Internacia Lingvo*" — organo de SEU).

Lastatempe ni povas observi inter adeptoj de Universala Lingvo ekstreme interesan fenomenon. Ĉiu nova grupo de homoj, apartenantaj al tiu aŭ alia sistemo de Universala Lingvo, aspiras kunligi esencon de propagando por sia sistemo kun certa ideologio kaj kun certa socia bazo.

Pri tio ni jam skribis siatempe (vidu en "Sennaciulo" n-oj 116—118).

Prof. Peano, propagandante sian sistemon de nov-latino, "*Interlingua*", celas krei *internacian lingvon de scienculoj kaj latinistoj*.

Italo Lavagnini proklamas sian sistemon "*Monario*", kiel internacian lingvon de "*Universala Astrologia Ligo kaj Instituto*".

Weisbart, aŭtoro de sistemo "*Medial*", vidante malsukceson de sia sistemo, provas unuigi ĉirkaŭ si adeptojn de *Universala Eŭrop-Azia Lingvo*, havanta krom elementoj eŭropaj, ankaŭ elementojn de aziaj dialektoj. Tiamaniere Weisbart kontraŭstarigas al esperanto kaj aliaj lingvo-sintezoj de eŭropa kulturo — ideon de iu nova *lingva monstro: miksaĵon de franca, rusa, ĉina kaj hinda lingvoj.*

Sistemo "*Occidental*" siaflanke faras ĉion eblan por adoptiĝi al ideo, propagandata de pan-eŭropa ligo kaj tiamaniere kontraŭstari "bolŝevistan, proletan esperanton".

Tre interesaĵn konsiderojn pri tiu temo, ni trovas en fruntartikolo de n-o 1 de revuo "*Cosmoglotta*", ĵus komencinta aperi en Wien anstataŭ ĉesinta aperi samtitola eldonaĵo en Reval. Tiun ĵurnalon eldonas eks-idistoj, tute prave notantaj: "La diferencoj en Ido kreskas, la fendaĵoj inter reformemuloj kaj konservemuloj plivastiĝas. Post mallonga tempo aparta idista movado estos malebla. La idistoj nur havos la elekton: aliĝi al esperanto aŭ al Occidental."

Preskaŭ per la samaj vortoj aŭtoro de fruntartikolo J. Prorok ripetas esprimitan de ni konsideron pri socia nebuleco kaj nedifiniteco de ido-movado, kiu estas kondamnita al senhelpa balanciĝado inter simpla kaj primitiva esperanto kaj malsimplaj sciencaj, plene eŭropaj, nov-latinaj sistemoj.

Kaj plue — Prorok konkrete demandas, same konkrete respondante:

"Ĉu nun esperanto, liberigita de sia granda konkuranto — Ido, povos triumfi? Tio dependas nur de la politika situacio en Eŭropo, ĉar la decido en tiu batalado fariĝos tie ĉi en Eŭropo, ne en Ameriko, nek en Orient-Azio."

"Se Eŭropo en la proksimaj 10 ĝis 20 jaroj estos venkakirata de la rus-ĉinaj bolŝevistoj, aŭ ruinigita de mondrevolucio, aŭ interna milito, la venkinto eble estos esperanto. Sed se la «*common sense*» venkos en Eŭropo kaj kondukos al iu speco de solidara Tuteŭropo, ĝi estos iu lingvo, evoluinta sur bazo, montrita per Occidental, tuj komprenebla por ĉiuj kleraj eŭropanoj.

Ĉar tiom longe, kiom la kleraj klasoj de la loĝantaro gvidos la sorton de Eŭropo iu ĵargono kiel esperanto, kies sistemo staras ekster la kunteniĝo kun la tradiciaj eŭropaj lingvoj kulturaj, hereditaj de la klasika antikveco kaj mezepoko, devas bankroti antaŭ Occidental, kiel antaŭ 40 jaroj Volapük bankrotis ĉe apero de esperanto."

Tia difino de objektiva aferstato kiel ĝin prezentas al si malamikoj de esperanto, — estas tiom rimarkinda, ke ĉiuj ni, utiligantaj simplan esperanton ĝuste por plialproksimigo de mondrevolucio kaj por plifortigo de interligo inter diverslandaj laboruloj, devas pri ĝi memori.

Per tiuj vortoj estas jam ĉio dirita. Jam kiel ilustraĵon de tiuj praktikaj "metodoj", per kiuj Occidental celas "definitive" venki esperanton kaj esperantistojn, estas utile citi ankoraŭ unu, konkludan, eltiraĵon el la sama fruntartikolo:

"En la estonteco Occidental havos pluan armilon kontraŭ esperanto, ĉar la malkaŝa protektado, farata al esperanto de Sovetregistaro kiu eldonis poŝtmarkojn kun surskribaĵo en esperanto, baldaŭ altiros la egan atenton de la nekomunistaj registaroj de Eŭropo, kaj tiam esperanto en iliaj okuloj estos la lingvo de la komunistoj."

Tiuj vortoj estas senkaŝa aludo pri polico, ĝendarmaro kaj aliaj protektrimedoj de "nekomunista sociordo".

Sed tiu aludo nin ne timigos. Tiu lasta argumento kontraŭ esperanto — samtempe estas plej bona argumento de ĝia kreskanta forto kaj de la malforteco de ĝiaj kontraŭuloj.

La Estonto estos nia. Post tiuj vortoj dubi pri triumfo de esperanto. signifus rifuzi konvinkon pri neevitebla triumfo de Revolucio, pri triumfo de nia porrevolucia laboro kaj batalo. *E. Drezen.*

(Tradukis el rusa *Al. Dmitriev.*)

Ĉe la neŭtraluloj.

NOVA PROPAGANDMETODO

S-ro Edmond Privat, pri kiu oni ne vane ja ĉiam diras "eminentulo", eltrovis novan propagandmetodon. Ni esperas ke la tuta SAT-anaro dezirante uzi ĝin tuj eklernos francan lingvon. Ni do citu el n-ro 9 de *Nederlanda Laborist-Esperantisto* kelkajn pecojn el tre bonhumore skribita raporto pri III-a Nederlanda Esp. Kongreso:

"... Posttagmezo de senfina enuo. Unue la malfermo. Orgenludado je memoro de Zamenhof. Poste franclingvaĵo de Privat, la UEA-estro (enhavo: sensencaĵoj). Sekvas franclingvaĵo de la prezidanto kun kelkaj holandaj vortoj (enhavo: sensencaĵoj). Orgenludo. Finfine kelkaj gramoj da esp-o: esp-a parolado de Privat (sensencaĵoj).

La prezidanto denove parolas holande kaj enkondukas profesoron Casimir kiu paroladas pri "nenio". Ĉio miksita kun orgenludado ..."

Tio estas kelkaj pecoj el la notlibro de l' aŭtoro. Poste li eksciis, ke s-ro Privat parolis france "por ke la aristokratoj interesiĝu pri esp-o". Do resume, por konvinki holandanojn pri utileco de esp-o oni devas paroli france. Dankon al s-ro Privat. Li agis kiel vera eminentulo!

En la sama n-ro de NLE ni legas ankaŭ komencon de raporto pri la SAT-konferenco en Haarlem. Kiam ĝia fino aperos en sekvonta n-ro de NLE, ni parolos al ĝi pli detale. Dume estu rimarkite, ke dum la SAT-konferenco oni bedaŭrinde parolis nur esp-e, ne france...

La Lingva Angulo

Demandoj:

1. Pri la frazo: "Nenial li batis iun". Ĉu ĝi signifas, ke li ja batis, pro nenia kaŭzo; ke li ne batis, pro ia kaŭzo; egale unu aŭ alia? Oni malofte renkontas la vorton "nenial", ĉu pro dubesenceco? 509.

2. Mi spertas grandan malfacilon pri "ig" kaj "iĝ", kiuj certe devus plifaciligi *la uzon de la lingvo. Ĉu estas ia regulo per kiu oni povas scii, ĉu verbo estas ŝanĝebla en la "ig"-formon, en la "iĝ"-formon, aŭ en ambaŭ formojn; kiel "decidi"?* 509.

Respondoj:

1. NENIAL signifas: "pro neniu kaŭzo, pro neniu motivo". Oni malofte uzas ĝin pro tio, ke la bezonoj de la ĉiutaga komuna lingvo malofte donas taŭgan okazon por uzi ĝin. Ne ĝi, sed la citita frazo estas dubesenca. Esceptante la vortojn, kiuj esprimas konkretaĵojn, ĉiuajn vorto povas fariĝi dubesenca, se ĝi estas maltaŭge aŭ mallerte uzata. La citita frazo estas simple tute malklara kaj malbona kaj ne meritas komentarion.

2. Preskaŭ ĉiuj malfacilaĵoj kaj konfuzoj, kiujn oni renkontas ĉe la uzado de la sufiksoj IG kaj IĜ, devenas nur de malatento aŭ nescio pri la ĝusta signifo de la verba radiko kaj precipe pri ĝia transitiveco aŭ netransitiveco. Tiun transitivecon aŭ netransitivecon montras la vortaroj, sed tro multaj esperantistoj forgesas, ke antaŭ ol uzi iun ajn lingvon, eĉ plej facilan, estas necese lerni ĝin.

Precipe malkorekta, nepravigebla kaj kondamninda estas la sencela, superflua kaj taŭtologia aldono de IG al verbo, kiu estas jam per si mem transitiva, simple por montri la transitivecon. Malferminte la unuan renkontitan esp. gazeton, mi trovas en ĝi la kunsufiksajn verbojn: "vestigi, sufokigi, disvolvigi, diskutigi, enŝlosigi, armigi" uzitajn anstataŭ la ĝustaj sensufiksaj jam per si mem transitivaj formoj: "vesti, sufoki, disvolvi, difekti, enŝlosi, armi". La uzintoj kredeble imagas, ke ĉiu ajn transitiva verbo devas nepre enhavi la sufikson IG, kio estas erarego. Nur netransitivaj verboj bezonas la aldonon de IG por fariĝi transitivaj.

Kvankam estas neeble doni al vi ordonan absolutan regulon, mi povas tamen prezenti simplan praktikan konsilon:

1. Bonvolu relegi la tiuteman respondon de Zamenhof (LINGVAJ RESPONDOJ, Plena Kolekto, p. 31).
2. Zorge atentu pri la transitiveco aŭ netransitiveco de la verba radiko.
3. Neniam aldonu IG al transitiva verbo; esceptante la verbojn SIDIĜI, STARIĜI, KUŜIĜI, neniam aldonu IĜ al netransitiva verbo.
4. Se vi bezonas esprimi la ideon: "ebligi aŭ permesi aŭ ordoni al iu fari, komisii iun ke li faru", uzu prefere la vorteton IG kiel apartan sendependan vorton kun la infinitivo de la transitiva verbo.
5. Se vi bezonas pli precizajn respondojn, bonvolu citi al mi la frazojn aŭ vortojn, kiuj embarasas vin. *Fakulo.*



RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Esperanto-Mondo, Internacia monata revuo por Literaturo, Tekniko kaj Sciencoj. N-o 1. Redaktejo - Administrejo: L. Dederichs, Hannover, Sallstr. 124. Formato: 23×31, 16 pĝ. Jarabono: 1 dolaro; luksa eldono: 2 dolaroj.

La redaktantoj de tiu nova revuo posedas monon, ili eĉ havas kelkajn bonajn ideojn, sed malposedas esperantan gramatikon. Jam sur la unua paĝo en la redakcia alvoko (i. a. subskribita "La Redaktejo"! ĉu la *ejo* de la redakcio ĝin skribis?!...) ni trovas jenan perlon: "Laŭ amplekso ĝi superos ĉiujn revuojn ĝis nun aperintaj..." Malfeliĉa akuzativo!... En alia artikoleto, subskribita "Red." (esperebIe "Redakcio", ne "Redaktejo"): "Jam forpasis dek jaroj, *ke* nia kara majstro mortis." Tiu *ke* anstataŭ *de kiam* aŭ *depost la morto* altenlevis miajn harojn. La dimensioj de nia recenzo ne ebligas doni kompletan liston de ĉiuj eraroj de ni trovitaj. Esperebie, s-ro E. Grosjean-Maupin, ano de la Esp. Akademio, kiu redaktas la rubrikon: "Prilingvaj demandoj kaj respondoj", instruos la lingvon al la respondecaj redaktoroj... *Ereto.*

ENHAVO:

Raportaro de la Ekzekutiva Komitato de SAT	pĝ. 1—4
Letero al tutmondaj Kamaradoj, de P. Ostrij	„ 5
Sacco kaj Vanzetti, de Ino-Kor.	„ 5
El la sendependa Polio, de Iuelmultiuj	„ 5
Tra Esperantio	„ 6—7
La Lingva Angulo, de Fakulo	„ 8
Recenzejo, de Ereto	„ 8
Korespondado	„ 8

K * O * R * E * S * P * O * N * D * A * D * O

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. or., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.
L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl. = poŝtmarko sur bildflanko, k. ĉ. l. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo.
Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

Aŭstrio.

K-do *Leopold Jambov,* Reinprechtsdorfer Str. 13, II/20, *Wien V.*, dez. koresp. kun Gekdoj el ĉ. l., PK, PI.

— Kelkaj K-doj de esp. rondeto dez. koresp. k. ĉ. l., krom Germanio, L, PK, PI. Adr.: K-do *L. Tabaka, Enzesfeld n-o 82.*

Bulgario.

Mi tre dankas al la Gek-doj skribintaj al mi post la enpreso de mia korespondpeto en n-o 136 de "Sennaciulo". Samtempe mi petas ilian senkulpigon, ke nun ne eblas al mi korespondi, ĉar mi estas vokita al ŝtatservo. Do, la Gek-doj bonvole paciencu!

SAT-ano n-o 9432 en *Petriĉ.*

Germanio.

— Naturamiko k. fotanto dez. koresp. kun gesamuloj el ĉ. l. Adr.: K-do *Max Benedix,* n-o 115, I., *Neukirchen i. Erzgebirge.*

K-do *Richard Schulz,* Blücherstr. 8, *Nowawes,* interŝ. belajn PI, bfl. k. ĉ. l., serĉas precipe daŭran interŝanĝon.

K-do *Bernhard Lehmann,* Schwielovseestr. 2, *Caputh,* interŝ. belajn PI, bfl., serĉas precipe daŭran interŝanĝon.

K-dino *Hedwig Gabriel,* Wallstr. 14, *Nowawes,* interŝ. belajn PI, bfl., serĉas precipe daŭran interŝanĝon.

K-doj *Albert* k. *Erich Weissbach, Langenchursdorf i. S.,* dez. interŝ. belajn PI, bfl. k. PM. Resp. garantiata.

Polio.

— Bankoficisto dez. koresp. pri laborkondiĉoj en ĉiul. bankoj. Adr.: *J. Namiot,* Al. 1. maja, 35, *Lodz.*

Sovetio.

K-do *B. Stefanov, P. O. V.-Dolgoje,* Orlovsk. gub., dez. koresp. k. ĉ. l. pri revolucia movado k. politikkleriga laboro.

Scivolantoj pri historio, vivo, moroj ktp. de mez-aziaj popoloj, turnu sin al: K-do *A. Jadlowker,* USSR, *Turtkul Kazakstan,* Mez-Azio, Obstatotdel. Rekompence mi petas por esp.-propagando PI, naciaj gaz. il., vidaĵojn ktp.

Svisio.

Adresŝanĝo: K-dino *Henrikino Danneil,* Servette, 79, *Genève* (stratŝanĝo).

ALVOKO!

La laborista sportasocio Essena festos (30.—31. julio) sian 25-jaran jubileon; ĉar kunvenos multaj sportuloj kaj laboristoj, estus dezirinde, ke la diverslandaj K-doj kaj proletaj organizoj sendu salutskribojn en esperanto. Adr. al K-do **H. Hamm, Essen,** Flasshofstr. n-o 11 (Germanio).

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)